


Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE *HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ*

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k73.html>

Ĉi tiu homo murdis la sekvantajn homojn:

- 1 **Vicente Romero**
- 2 **Juan García**
- 3 **Esteban del Amo**
- 4 **Eugene Kent Brown**
- 5 **Juan Carlos González**
- 6 **Vicente Javier Domínguez**
- 7 **Juan José C. Vázquez**
- 8 **Juan Mateos Pulido**
- 9 **Alberto Alonso Gómez**
- 10 **Ricardo Sáenz de Ynestrillas**
- 11 **Carlos Besteiro Pérez**
- 12 **Francisco Casillas Martín**
- 13 **Jesús María Freixes**
- 14 **Santiago Iglesias Rodino**
- 15 **Carmelo B. Alamo**
- 16 **Miguel A. Cornejo Ros**
- 17 **José Calvo Gutiérrez**
- 18 **Andrés José Fernández Pertierra**
- 19 **Antonio Lancharro Reyes**
- 20 **José Joaquín García Ruiz**
- 21 **Jesús Gimeno Gimeno**
- 22 **Juan Ignacio Calvo Guerrero**
- 23 **Javier Esteban**
- 24 **Ángel de la Higuera López**



Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez,**
c/ Jabonerías, 6-3^oD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Vicprezidanto: **Pedro Ruiz García,**
c/ Almenara, 17-2^o B,
ES30 004 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells,**
Av. Murcia, 7-3^a A
30110 Cabezo de Torres (Murcia)

Kasisto: **Carmen Hernández Valdés,**
Avd^a Marina Española, 15-3^aA
30008 Murcia.

Redaktoro: **Jesuo de las Heras,**
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

ISSN 1697-6460

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marček,
- 2 **Boletín**, de Manuel Pankorbo,
- 3 **Monato**, de Stefan Maul,
- 4 **Juna Amiko**, de Geza Kuruez,
- 5 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
- 6 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
- 7 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Puil,
- 8 **Litova Stelo**, de Petras Čielauskas,
- 9 **La Migranto**, de Antje Noordewier,
- 10 **SLEA-Informilo**, de P. Persson,
- 11 **Naturista vivo**, de Ervin Fenyvesi, kaj
- 12 **La verda proleto**, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

Pretigas la Kajeron:

Provkorekto: **José Pina Tuells,**

Redakto: **Jesús de las Heras**

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al nova konto n^o 2043-0138-14-090002040-3 Sen aldona kosto. La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.



Kovrilo: Sur nia kovrilo oni vidas foton de teroristo De Juana Chaos, sur kiu pendas la nomoj de la homoj de li murditaj.

Enhavo

Redaktore: Ne silentu ni	3
Pasrolas la Prezidanto	4
SAT 2006 k	5
Tajlando: la krio de mia supliko	6
La Bahaano en Hajfo	9
Flagaj milito, politiko kaj timo	10
Vera Valentaite	14
La Faraono, ĉapitro 19 ^a	18

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni povas reprodukti artikolojn, kondiĉe ke oni citu la originon.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore

Ne silentu ni!

Ni ankoraŭ ne silentas, eĉ se ni ne aperis de la lastaj ses monatoj. Mi devas pardonpeti la leganton, sed kelkaj problemoj personaj kaj ankaŭ manko da mono en nia asocio malebligis tion.

Ni ne sukcesis instrui Esperanton en proksima urbeto al Mursjo, Yecla (prononcu ĝekla), sed tion ni faros en la proksimaj monatoj. Pro tio, ke ni ricevos monon pro nia instruado (!), nia buĝeto permesos al ni aperi pli ofte ol dum la jaro 2006.

Antaŭ kelkaj tagoj, la 3-an de februaro, miliono kaj duono da hispanoj diris, ke ja sufiĉas pri terorismo. Espereble, la registaro obeos la voĉon de la popolo, kaj ĉesos negocadon kun murdistoj, kiu kondukos al nenio sed al katastrofo.

Alia problemo, kiu zorgigas nin, estas infanoj. Ili iam regos la mondon, sed ne dum ili estos infanoj, sed kiam ili jam preskeskiĝis. Pro tio, ni devas denunci mistrakton kaj ekspluatadon seksan. Ni pensigas en ĉi tiu numero pri la manieroj helpi fari tion, ke ili kresku pace kaj juste.

Laste mi notigu, ke **Sennaciulo** daŭre makulas siajn paĝojn per la stultaĵoj mensogaj kaj sensencaj de Tonjo de l' Barjo pri ĉi tiu magazino. Mi ne rimarkas ilin, ĉar tio estus gravigi ilin du senmerite.

Jesua



Parolas la Prezidanto

Estimataj legantoj kaj ankaŭ gehaleanoj!



Antaŭ kelkaj monatoj mi legis artikolon en la Hispana lingvo pri la merkato de la sekso en infanoj. Mi legis ke infanoj de sep aŭ ok aŭ naŭ jaroj seksumis kaj seksumas por mono. Ili estis kaj estas vendataj de sia gepatroj pro mono.


Mi ŝatis multe la artikolon kaj mi kontaktis kun la direktoro de la bulteno por ke publiku la artikolon, kion ili permesas al ni, nia bulteno, ke nia povas publiki la artikolon.

Unue la permeso, due la traduko kaj trie la publikado de la artikolo.

Nia financoj estas bona ĉar nia budĝeto por la jaro 2007 estas fermita kaj kompleta. La Asocio bezonas novan haleanoj kiu volas esti Prezidanto aŭ Direktoro de la bulteno.

Tio signifas ke en la nova elekto mi ne prezentos mian kandidaturon.

*Johano Cabezos,
Prezidanto*



SAT 2006 K

Deklaracio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006:

- ~Malakceptas ĉian terorismon, ĉu fare de ŝtato ĉu fare de alia organizaĵo, kiu mortigas homojn;
- ~SAT alvokas ĉiujn, i.a. esperantistojn, prepari kondiĉojn de longdaŭra paco en Mezoriento per historia klerigado kaj disvolvo de interfratiĝaj rilatoj ĉe ĉiuj koncernatoj cele al akcepto de frataj kaj ekvilibraj solvoj;
- ~Postulas la liberigon de la malliberigitoj, kiujn la usona ŝtato kontraŭjure tenas en la koncentrejoj en Guantanamo kaj aliaj lokoj,
- ~Je la nomo de la «milito kontraŭ terorismo», kaj postulas la liberigon de ĉiuj politikaj malliberuloj en la mondo;
- ~Rediradas al la landoj, kiuj ankoraŭ ne subskribis la Konvencion de Otavo, ke URĜAS subskribi tiun Konvencion por elimini la
- ~Kontraŭpersonajn minojn sur nia planedo;
- subtenas la batalon de C.M.C.: Monda Koalicio kontraŭ la pafaĵojetoj el bomboj, kaj deziras, ke SAT entru en la Koalicion por partopreni en tiu batalo;
- ~Solidariĝas kun ĉiuj bataloj en la mondo kontraŭ la detruo de la socialaj rajtoj kaj alvokas al sennaciigo de ĉi tiuj bataloj; ĝi salutas la venkon de la francaj studentoj, laboristoj, pensiuloj kaj senlaboruloj kontraŭ la kontrakto por unua dungo en Francio;
- ~Alvokas al energia kontraŭstaro de la naciisma edukado trudiita en lernejoj en la tuta mondo, kaj aparte solidaras kun la batalantoj por la konservo de la 9-a artikolo de la japana konstitucio;
- ~Protestas kontraŭ la politiko de la Eŭropa Unio, de Usono, Aŭstralio kaj aliaj landoj, kiu i.a. manifestiĝas per fermo de landlimoj kaj forpelo de neleĝe alvenintaj enmigrantoj; ĝi postulas enmigra politikon kun humanisma sinteno;
- ~Defendas la liberecon de konscienco kaj la rajton ĝin esprimi; pro tio ĝi ankaŭ promocias la disigon de la eklezioj disde la ŝtato.



Gvidrezolucio

La 79-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kunveninta en Beogrado de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto 2006 :

- > Petas ĉiujn, kiuj tion povas, helpi al SAT per mondonacoj;
- ~**Esprimas sian fidon al la PK** por, konsiderante la proponojn faritajn dum la kongreso, solvi la financon krizon laŭ la plej bona maniero samtempe por SAT kaj por Kreŝimir Barkoviĉ, inkluzive per vendo de la sidejo kiel eventuala solvo; ĉe kio ĝi postulas, ke li okaze de maldungo ricevu la diferencon inter sia antaŭa salajro kaj la ŝtata senlaborula kompenso, kaj ke li poste ricevu enspezon egalan al la antaŭe atendita pensio;
- ~Alvokas plu diskuti la proponon pri Eldonkooperativo de SAT, kun la celo alkonduki decidon per baldaŭa referendumo;
- ~Proponas, konsiderante la bezonon pri allogo de novaj membroj, i.a. junuloj, malfermi je limigita tempo la interretan SAT-diskutejon al simpatiantoj, kiuj havas rekomendon de SAT-kamarado;
- ~Vokas al pliriĉigo de la esperanta Vikipedio, ĉefe en ĝia socipolitika parto, al verko aŭ traduko de SAT-rilataj artikoloj en nacilingvaj Vikipedioj, kaj al intima kunlaboro per- kaj por-esperanta kun nacilingvaj retejoj, kies celoj kongruas kun tiuj de SAT;
- ~Rekomendas perretan LEA-kunlaboron, spronas al energia varbado por SAT, kaj vokas al kreado de novaj LEA-oj tie, kie ili ne ekzistas;
- ~Salutas la revigliĝon de la Porpaca Frakcio de SAT.

Tajlando: La krio de mia supliko

Ekde antaŭ 8 jaroj estas tradukataj miaj libroj en Tajlando, danke al Rasami Krisanamis, profesoro pri hispana lingvo ĉe la Universato de Bangkoko. Ŝi petis al mi la aŭtorrajtojn de mia junul-novelo *Cucho* (pron. kuĉo), sciigante min ke ŝi ne povos pagi ilin, ĉar ŝi sindediĉis senprofite al la helpo de la malriĉaj infanoj de la nordaj montoj de Tajlando. Mi cedis la rajtojn al ŝi, ne pro malavareco, sed pro mallaboremo. Kiel mi priokupiĝu pri perlaboro de aŭtorrajtoj en la antipodo, kiam kelkfoje estas penige perlabori ilin en Francio aŭ Germanio?

Ekde tiam ĉio estis agrablaj noticoj; ofte ŝi informis min pri siaj profitoj el la vendado de la libro kaj pri la uzoj de ili: lernejoj, stipendioj, domoj por profesoroj, ...kaj mi ne povis elmiri, konscia pri la fakto ke tute nevolonte mi ekestis mecenato en Tajlando. Mi poste cedis ankaŭ la rajtojn de aliaj miaj libroj, kiuj ŝi ne nur tradukis, sed ankaŭ presigis ĉe budhisma presejo — ĉar neplie ŝi montris sin kiel aninon de tre strikta budhisma movado nomita Santi Asoke — kaj ŝi mem respondecis pri distribuo kaj vendo de la libroj.

Unue per leteroj kaj poste, okaze de kel-

kaj el ŝiaj vojaĝoj, ŝi insinuis, per la tipa orienta ĝentilo, ke mi iru prelegi al la Universitato Chulalonghorn (ĉulalonghornŭL), en Bangkoko, ĉar mi estas la hispana aŭtoro plej tradukita en la tajlandan, kio estis vere danke al ŝi. Kaj, finfine, antaŭ 1 jaro ŝi revenis en Hispanion kaj diris min ke ĉio estis aranĝita tiel ke mi povos vojaĝi prelegi al Bangkoko, kun pagitaj biletoj, k.t.p. Mia edzino kaj mi ridetis al ŝi, dankis ŝian intereson kaj, ĵus forlasinte nin, ni ĵurligiĝis kontraŭ ajna stimulo el la mondo celanta nian vojaĝon al Bangkoko por prelegi antaŭ grupo de budhismaj hispanistoj. Sed fakte, post 2 monatoj ni superflugis Romon voje al Tajlando, ĉar Rasami Krisanamis estas kvazaŭ senbridita forto de la naturo kiu,



neniam fiedukite, sukcesas pri ĉio kion ŝi volas.

Longa vojaĝo.- En Tajlando okazis al ni tiomaj aferoj ke mi finfine verkis libron pri cxio tio, kaj mi antaŭdiras ke tio kion plej impresis min estis «La krio de mia supliko», kaj jen alia el la donacoj de la vivo kiujn mi ricevis en mia matureca aĝo: la amikiĝo al la pastro Alfonso de Juan, jezuita misiisto, kunlaboranta kun Rasami je la helpo al siaj proksimuloj. Dekomence, pro etanimeco, mi ne sufiĉe komprenis kian kunlaboron povas fari budhana reformistino kun jezuita misiisto; male Rasami ne sufiĉe komprenis kial mi ne komprenis tian kunlaboron. Ĉu por bonfaradi kune nepras havi la saman kredon?

Pastro Alonso jam de 40 jaroj estas luktanta en Tajlando ĉe la plej diversaj frontoj, kontraŭ la potenculoj kiuj trouzas la malfortikulojn - kambogxajn rifuĝintojn, «boathomoj» el Vjetnamio, ..., kaj nun sia batalo estas fokusita en la plej infamian el ĉiuj sociaj makuloj: la infana prostituado, kiu komencas je la landlimo de Kamboĝo, aŭ en la nordaj montoj de la lando, sed kiu ŝprucas la tutan homaron. Temas pri ummiljona profita negoco, antaŭ kiu la Estraro malfermas siajn okulojn kredante ke tiu favoras la turisman industrion. Tial stariĝis seks-industrio - jen kiel ĝi estas nomata- kun agentoj kiuj trairas la malriĉajn vilaĝojn aĉetante infaninojn por labori sekse je sia profito . Kiam tiuj kompatindaj infaninoj troviĝas en Bangkoko, ili estas sen-

orientitaj, ili ne konas la lingvon, ĉar ili nur regas siajn dialektojn; ili estas fitraktataj, oni eĉ kripligas ilin tiel ke ili ne povu eskapi. Fine ili ĉiuj estas kontaĝataj de ajdoso. Ili konvertiĝas en infaninojn kun neripareblaj postsekvaj, kaj tre malalta memestimo —ili opinias sin malpuraj—.



Helpo.- « La krio de mia supliko» estas vidbendo farita de pastro Alfonso kun la kunlaboro de Rasami, en diversaj lingvoj, kiu enhavas la suplikojn de tuj infaninoj por ne esti vendataj al la putinejoj kaj ricevi helpon. Kian helpon? Klerigadon. Kiel klarigas pastro Alfonso: Kiam ni sukcesas reteni tiujn infaninojn ĉe ties naskiĝlokoj,

doninte ilin utilajn klerigadojn, taŭgaj por lerni profesiojn kaj la lingvon de la lando, ni jam estas savintaj ilin kontraŭ putiniĝoj, ĉar ili kapablas sin defendi. Por tio necesas stipendioj, burokratia koncepto pri kiu mi aŭdis paroli al Rasami kun iom da skeptikeco, ĉar mi ne sciis ke ĉiu stipendio devos utili al infanino 12-jaraĝa, 13-jaraĝa, aŭ pli aĝa. En Tajlando estas problemo, pastro Alfonso devas evoluigi postuleman selektolaboron helpate de valoraj kunlaborantoj. En unu el siaj lastaj leteroj li informis min pri la inkluzivigo en sian teamon de doktoro Arak, kiu antaŭ 3 jaroj estis elektata kiel «Plej elstara kampara doktoro el Tajlando» kaj kiu selektis 6 muzulmanajn infaninojn malriĉegajn, en serioza situacio de danĝero. Tial, vi, amikoj legantoj, estu certaj ke viaj monhelpoj trafos tuje kaj efike la plejneceson, ne prikonsiderinte cirkonstancojn de rasoj kaj religioj. Tiuj belegaj infaninoj, tre maldikaj, kelkfoje skeletaj, havas kiel komunan kvaliton esti facilaj viktimoj de la agentoj de la seksa industrio, ĉar ili apartenas al

misfunkciantaj familioj, sen patroj, aŭ kun patroj kiuj plej bone ne estu, ĉar ili estas la unuaj interesitoj vendi ilin.


En la apudaj fotoj aperas pastro Alfonso ĉiam ridetanta, kun feliĉoplena vizaĝo; ne strange, ĉar devas esti mirinde forrabi tiujn infaninojn el la infero kiu minacis ilin. Pastro Alfonso estas kurioza estaĵo, ĉar li ne eltenas la maljustecon, kaj estas en la konvinko pri la fina venko de la bono sur la malbono.

Kalkulante kun tiu ĉi vivitineron, ne estas strange ke la Reĉo de Hispanio nomumis lin kavaliron de la Ordeno de Elizabeto la Katolikulino, kaj al Rasami Krisanamis Damon de la sama ordeno. Tio signifas ke ili estas unu kiel la alia.

La fotojn de la pastro senditaj al mi enmetas mia edzino —kiu estas tre lerta por tiuj aferoj— en panelojn kiuj situas en tre videbla loko de la domo, por ke ni ne forgesu ilin. Kaj ne estas facile forgesi kiam vi estas elrigardinta la problemon.

Johano

Tajlando: kaj paradiso kaj infero...



LA BAHAAÑOJ EN HAIFO

La unuaj Bahaanoj alvenis en la Sankta Lando (tiam la Otomana Imperio) en 1868 kiel malliberuloj ekzilitaj el Irano pro herezo kontraŭ Islamo. Unue ili estis enkarcerigitaj en la acha prizono de Akko kune kun ĉiuspecaj krimuloj. Post multaj jaroj Baha'u'llah povis vivi en kampara domo apud Akko, nomita Bahji, kie Li forpasis en 1892. Li postulis ke la restaĵoj de Bab, Lia antaŭulo, estu entombigitaj en la Monto Karmelo, je la alia flanko de la golfo. Tion prizorgis la filo 'Abdu'l-Bahá en 1909 post la Junturka Revolucio, kiu liberigis la tutan familion.

Pro tio la spirita kaj la administra centroj de la Bahaa Kredo nun troviĝas en Haifo, Israelo. Iom post iom kreskis la Arko chirkaŭ la Mauzoleo de Bab kun pliaj konstruaĵoj. La unua en 1957 estis la Arkivo, kie videblas por pilgrimoj la originalaj tabeloj kaj personaj memorajoj de la 3 ĉefaj personecoj de la Kredo. (Bab, Baha'u'llah, Abdul-Baha). Poste sekvis la impona Internacia Domo de Justeco, la sidejo de la naŭ reprezentantoj elektataj ekde 1963 ĉiuj 5 jaroj el la aro da delgitoj el la tuta mondo (t.e. de 181 naciaj asambleoj).

Dum 2 jaroj mi volontulas en la Internacia Biblioteko, kie kolektiĝas ĉiuj libroj pri la Kredo en diversaj lingvoj. Entute ni estas ĉirkaŭ 600 volontuloj el 80 landoj, kiuj harmonie kunlaboras en pluraj oficejoj aŭ fakoj.

La Bahaa Mondcentro havas bonajn rilatojn kun la ŝtato de Israelo, samkiel la urba registaro. La estro mem publikigis belegan fotoalbumon pri la ĝardenoj kaj terasoj, nomante ilin “la oka miraklo de la

mondo”, vizitata de miloj da homoj ĉiusemajne.

Pro manko de internacie aprobita komuna lingvo, ni ĉefe uzas la anglan kaj la persan, sed mi multe varbas por Esperanto kaj havas regulajn kunvenojn kun amikinoj, kiuj ŝatas lerni la lingvon.

Krome, la lokaj kaj regionaj israelaj Esperantistoj kunvenas unufoje monate ĉe mi por vigla diskutrondo pri diversaj temoj au ŝercoj.

Dum la pasinta bombardado de Haifo ni daŭrigis nian laboron kiel kutime, ĉar la plejmultaj oficejoj troviĝas en la Monto Karmelo kaj estas ege sekuraj kiel ŝirmejoj.

Nun ni ĉiuj esperas kaj preĝas ke paco estigos en tiu parto de la mondo, ke ĉiuj aldonos ilian kontribuon, ĉar, kiel diris Baha'u'llah: “Ĉiuj homoj estas kreitaj por antaŭenigi ĉiam progresantan civilizacion.”

H. Martha Otto, aŭgusto 2006



Flagaj milito, politiko kaj timo

Delonge en Hispanio ekzistas granda antaŭjuĝo *kontraŭ* la flago, kiu laŭ la Hispana Konstitucio reprezentas ĉiun hispanon. Laŭ mia kono, tio venas el la fakto, ke ĝi estas ankoraŭ rigardata kiel *tiu flago de Franko*, la fia diktatoro, kiu dum kvardek jaroj regis Hispanion. Fakte, dum tiu kvardekjara periodo, la flago estis tiu, de la Reĝoj de Hispanio de multe da jarcentoj. Eĉ dum la Unua Respubliko Hispana tiu flago estis oficiala. Nur dum la mallonga periodo de la Hispana Dua Respubliko ĝi ŝanĝiĝis al trikolora flago, ruĝa, flava kaj viola.

Estas ridindige, ke ankoraŭ homoj prenas tiun trikoloran flagon kiel flago de libereco, de ekvaleco kaj frateco. Tiuj prenantoj certe ignoras kiom da murdoj oni faris dum tiu sensenca periodo de nia historio ombre de tiu flago. Ili eble forgesis, ke la tiama prezidanto de la registaro diris, ke *eĉ ĉiuj preĝejoj de Madrido ne valoris unu vivon de vera respublikano*, kaj sekve ili lasis ilin bruliĝi sen fari ion ajn por halti la bruligantojn. Sekve, tiu flago ne protektis la artaĵojn, kiuj bruliĝis, aŭ la vivojn de aliaj respublikanoj, kiuj ne estis respublikistoj aŭ maldekstruloj. Ĉar anoj de la respubliko estis ĉiuj, kiuj vivis en Hispanio dum tia periodo, ĉar ili ĉiuj subtenis la ŝtaton per sia imposto kaj laboro. Sed la trikolora flago protektis revolucion socian, kiu celis la fizikan malaperon de tiuj, kiuj ne estis revoluciuloj. Tio jam okazis en Sove-tunio, kaj tio estas senca kialo por ke la demokratioj okcidentaj

neis helpon al tiu respubliko, kiu estis pli de maldekstro ol dekstro aŭ simple nedekstro.

El tiu manko da respekto por historio venas la kutimon en niaj junaj maldekstruloj nunaj svingi la flagon de la Dua Respubliko en siaj manifestacioj, ekzemple tiuj kontraŭ la milito de Irako. Neniu kritikis ilin pro tio, eĉ pro ilia manko da apogo al sia registaro kaj nacio en milito kontraŭ teroristoj. Mi kredas memori, ke nur mi iam demandis *Kiam oni bruligu la flagon de la Dua Respubliko?* (Kfr. <http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto-en-hispanio/message/9544>) Mi komentis al amikoj neesperantistaj, kaj ili skandaliĝe admonis min, ke oni ne ŝercu pri tiuj gravaj aferoj, kiuj povas vundi sentojn de homoj.

Tamen, ŝajnas vundi nenies sentoj tio, ke pri manifestacio kontraŭ terorismo kaj la politiko de la registaro —kio esence estas tre sana ekzerco de demokratia kaj liberama civitano— oni kritikis, ke oni uzis la flagon de Hispanio: ne la *kontraŭkonstitucia* kaj *kontraŭleĝa* franka flago —kies diferenco kun tiu nuna oficiala estas, ke ne estas aglo en la ŝildo, kiun ĝi havas— sed la oficiala flago, tiu, kiu reprezentas nin ĉiujn. Tiu flago, kiun ĉiu hispano devus emi porti kun fiereco kaj orgojlo. Tiu flago, kiun multaj hispanoj diras, ke ne reprezentas ilin, sed nur tiu de sia regiono, alidirite *aŭtonomio*. Sed estas absurde, ke tiuj partioj kaj individuoj, kiuj portas la *kontraŭhispanan* flagon de la Dua Respubliko en siaj manifestacioj disŝiru siajn vestaĵojn pro tio, ke *deks-*



Flago de Hispanio dum la Dua Respubliko (1931-1936).

truloj —tion ili diras— alproprigi la flagon, kiu estas ĉies, ne nur de ili. Tiuj stultuloj devus kompreni —kaj se ne, mi diras al ili el niaj paĝoj—, ke la sola maniero per kiuj tiuj *desktruloj* aŭ ne dekstruloj ne povas alproprigi la flagon de ĉiuj estas, ke ili mem, la



Flago de Hispanio dum la Diktaturo de Generalo Franko (1938-1975).

maldekstruloj, portu ĝin fiere kaj ree en siaj manifestacioj. Mi memoras, ke en la manifestacioj kontraŭ la milito de Irako mi vidis neniun flagon hispanan *kons-titucian*. Se mi vidis en televido multe da flagojn de la Dua Hispana Respubliko. Mi vidis flagojn de Katalunio, de la Partio Naciisma Vaska (alidirite la flagon de Eŭskio, kio ajn tio estas), de Andaluzio, eĉ de Murcio, sed ne tiun de Hispanio. Eble en tiu manifestacio kontraŭ la ekstera politiko de Aznar ne estis hispanoj, sed nur vaskoj, katalunoj, mursjanoj, valensjanoj, galegoj, kaj tiel plu. Sed ne mi vidis hispanojn, kiuj portis sian flagon. Mi vidis respublikanojn, jes, porti kaj svingi sian flagon de tempo kaduka, sed neniun parolis nome de Hispanio en tiu manifestacio. Kaj poste ili diris, ke naŭdek procento de hispanoj estis kontraŭ tiu milito. Nu, ne ŝajnis tio, laŭ la svingitaj flagoj. Oni ne povas malebligi, ke dekstruloj svingu la flagon de ĉiuj, sed oni fordonas ĝin al ili, se la nedekstruloj neniam portas ĝin.

Sed kial maldekstro tradicie malamas la flagon de Hispanio? Kial ili cedas ĝin al la reĝo, al dekstro, eĉ al Generalissimo Franko mem? Franko ne kreis ĝin, sed li uzis ĝin. Same kiel li uzis la projekton pri la Nacia Hidrologia Plano, kiun respublikanoj dezignis, kaj pri kiu la gvidanto socialisma Prieto mem diris, ke ne favori ĝin ne nur

igu onin kontraŭhispano, sed ankaŭ kontraŭmaldekstro, kaj fia persono. Nu, se la bona Indalecio Prieto nun povus vidi tion, kion la dua socialisma registaro de Hispanio faris pri tiu plano, li certe sindemandus pri

kie hispanaj socialistoj perdis sian socialismon, sian hispanecon, sian laborecon, restante nur partio, ĉar nun ne estas unika ideologio en ĝi. Pro nehispanoj mi aldonu, ke PSOE, la nomo de tiu partio, signifas Partio Socialisma Laborista (*obrero*, hispane) Hispana (*español*, hispane). Do, li facile povus veni en la konkludon, ke tiuj estas uzurpuloj, kiuj havas nenion komunan al PSOE.

Mi venas al la konkludo, ke maldekstruloj ne uzas sian nacian flagon, ĉar ili vere timas ĝin. Ili ne volas *malpurigi* per la ombro de tiu flago, kiu protektas ĉiun hispanon, aŭ kiu simboligas tiun protekton, kaj ili preferas uzi anstataŭ la flagon de sia regiono. Modernaj socialistoj hispanaj preferas aliĝi al naciistaj flagoj kaj naciistoj, eĉ se ili estas dekstruloj, kiel tiuj de CiU —Konverĝo kaj Unio—, aŭ PNV —Partio Nacia Vaska—. Tiel, ili favoras la kreadon de tajfoj, majstre priskribitaj de nia samideano Antonio Marko Botelja en sia *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*. Sed ili forgesas, ke se hispanoj finfine sukcesis forpuŝi muslimojn de ĉi tie, tio okazis pro tio, ke ili, la muslimoj, iĝis tajforegnoj. Nun danke al socialistoj ni estas la tajfanoj, kaj ili, la muslimoj, revenas... Mi ne konsideras nian Prezidenton Don Rodrigo aŭ Don Pelayo, sed moderna Grafo Don Ĥuljan'...




..... A PESAR DE TODO ESPAÑA NO SE RINDE

Malgraũ ãio, Hispanio ne kapitulacias.



Nekonata blondulino ne hontas vesti sin per la flago, kiu reprezentas ĉiun hispanon.



Vera Valentaite

Mi konis ĉi tiun litovan poetinon dum la kongreso Universala de Litovio, je 2005. Post privata legado en la sidejo de la Litova Esperanto Asocio, mi decidis, ke estus honoro por nia magazino ornami siajn paĝojn per beletraj kreaĵoj tiaj. Jen kelkaj el tiuj perloj:

kiam la homa animo
naskiĝas
ekbriliĝas
malgranda steleto
de la granda amo
mondestra
en ĉielo de la universo
kaj kune kun la kreskado
de tiu spirita planto
pligrandiĝas ankaŭ steleto tia ama
ili ektuŝos unu la alian iam ajn
kaj ili tiam estiĝos ia mirakla unuo
ĉar neniu ankaŭ nenio povas vivi ne
estiĝante
la tuta granda ĉielo
de la sankta lumo
de spuroj niaj—

09.02.2001

la neĝo malpura
purigis mian koron
sed ĝi ne permesis al si
ekpuriĝi
ankoraŭ ne (kaj eble neniam estos jes)
venis oportuna tempo
por tute liberiĝi
de teraj polvoj kaj polvegoj
tia polvaro
ankoraŭ bone varmigas
mian pekan tristan animon
kuŝantan en abismo
da malveraj sentoj kaj malgustaj
pensoj
pri si mem —
07.02.2001

La letero

En malhela nokto flugetis super arbaro malgranda unutaga papilio. Sur marborda sablo ekfuĝis rubando de spuroj. Ĝin tuj forlavis sala akvo. Sed veraj piedsignoj restis. Ne gravas, ke neniŭ ilin vidis aŭ simple eĉ neniŭ volis vidi.

—homoj iradas homoj fuĝadas kvankam ili mem ne scias kien ili montriĝas por si mem tiel gravaj ke estiĝas al ili maldireble strange foje renkonti tute indiferentan rigardon de preterpasanto kiel povas esti ke iu preterpasanto ne rimarkis tian unikulon sed ja ankaŭ al preterpasanto la plej grava estas li mem preterpasanto kaj subite estiĝas tiel triste tiel ekdomaĝas li sin mem foje tia sindomaĝo daŭras la tutan vivon sed ja ĝi estas simple krimo tia homo verŝajne entute forgesis fajnan sortan aroman floron la vivon

...florantaj pomarboj rosaj kruroj flugiloj pinto de la plej alta arbo polvetoj de la hejmlando subunge batanta koro lumo bordsablen enpremita hazarda nomo rideto de koloro kata murmuro inspiro cikonio sur tegmento grincado de la pordo okuloj de patrino libro verda herbo blindiga neĝo memoro vento en hararo...

Kiel multe estas da vortoj indaj por vivi kaj eĉ morti korpo povas trankvile antaŭe ilin ĉiujn eldirita konscience.

Morto – doloro – larmo kaj aliaj pezaj vortoj estas senpovaj kontraŭ flugo de la birdo aŭ kontraŭ kvankam nur dummomente tuŝiĝintaj manoj.

Vivo estas pli malforta ol la morto, sed ankaŭ ĝi iam venkos sin mem.

06. 02.2001

mi volas brakumi la tutan terglobon
sed kancero vivanta en mi ne permesas ekmoviĝi
mi volas adiaŭi min mem
kvankam mi ne scias kie loĝas mia mio
sed mi deziras vidi ĝin almenaŭ unufoje
ke povu retrovi min mem
post mia propra morto
ke mi ne malaperu en la eterneco frosta –
sed mi povas nenion
min regas damnita kancero
nur ĝin mi povas kreskigi en mi mem
sed ĝi ne respondas miajn naŭzajn demandojn –
ĉu povas la vivo morti kaj la morto vivi
kaj kiukolora estas mia propra morto –
la vivo estas peza ŝarĝo por ĝin portantaj konscienc
sed mi volus esti ŝarĝita eterne
mi amas min kaj mian vivon
la vivo estas sola mia amato
kiu ankaŭ amas min
kaj amos mi kredas eterne – – –

21.01.2001

**La kredo estas
kvazaŭ kancero
ĝi ĉiam vivas en vi mem
sed vi mem ne povas scii
kiam vi ĝin ekvidos eksentos
ekaŭdos kaj tiel plu
kaj ili ambaŭ estas helpiloj
por**



**ekkompreni karecon
de propra kaj fremda vivo
por ekflari sin mem aŭ
la tutan
universon
por esti vera viva estaĵo
multkolora multodora
amema**

21.01.2001

La faraono

XIX^a Ĉapitro.

La eksterlandula kvartalo en Memfiso estis en la nord-orienta angulo de l' urbo proksime de Nilo. Oni kalkulis tie kelkcenton da domoj kaj dekkelkon da miloj da loĝantoj: Asirianoj, Hebreoj, Grekoj kaj precipe Fenicianoj. Tio estis riĉa kvartalo. Strato tridek paŝojn larĝa, sufiĉe rekta, pavimita per plataj ŝtonoj, formis la ĉefan arterion. De ambaŭ flankoj leviĝis domoj brikaj, sabloŝtonaj aŭ kalkŝtonaj, tri ĝis kvin etaĝojn altaj. En la keloj estis tenejoj de krudaj materialoj, en la surteraj etaĝoj loĝejoj de riĉaj homoj, pli alte stabloj de teksistoj, juvelistoj, ŝuistoj, supre malvastaj loĝejoj de laboristoj.

La konstruaĵoj en ĉi tiu kvartalo, cetere kiel en ĉiuj aliaj, estis plej parte blankaj. Sed oni povis vidi ankaŭ domojn verdajn kiel la herbejoj, flavajn kiel la tritikaj kampoj, blujn kiel la ĉielo kaj ruĝajn kiel la sango.

En multaj domoj la antaŭaj muroj estis ornamitaj per pentraĵoj, prezentantaj la okupojn de iliaj loĝantoj.

Sur la domo de la juvelisto longaj vicoj de pentraĵoj anoncis, ke ĝia posedanto vendas al fremdlandaj reĝoj ĉenojn kaj braceletojn, faritajn de li, kiuj naskis ilian miron. La grandega palaco de la komercisto estis kovrita per pentraĵoj, rakontantaj la penojn kaj danĝerojn de la komercista vivo: sur la maro kaptas la homon teruraj monstroj kun fiŝaj vostoj —en la dezerto flugilaj, fajron elspirantaj drakoj, kaj sur la malproksimaj insuloj

lin turmentas grandeguloj, kies sandalo estas pli granda ol fenicia ŝipo.

La kuracisto montris sur la muroj de sia kabineto personojn, kiuj dank' al lia helpo retrovis la perditajn brakojn kaj kruojn, eĉ la dentojn kaj la junecon. Kaj sur la konstruaĵo, okupita de la administrantaro de l' kvartalo, oni vidis barelon, en kiun oni ĵetas orajn ringojn, skribiston, al kiu iu murmuretas en la orelo kaj kondamniton, kiun bastonas du aliaj personoj.

La strato estis plena. Apud la muroj atendis la portilistoj, ventumistoj, sendatoj kaj laboristoj, pretaj al servoj. En la mezo ondis seninterrompa ĉeno de komercaĵoj, portataj de homoj, azenoj aŭ bovoj, jungitaj al veturiloj. Sur la trotuaroj svarmis kriemaj vendistoj de akvo, vinberoj, daktiloj, fumajitaj fiŝoj kaj inter la vendistoj kolportistoj, muzikistoj kaj ĉiaspecaj artistoj.

En ĉi tiu homa fluo, kiu ruliĝis, dispuŝis, aĉetis kaj vendis, distingigis la policistoj. Ĉiu havis brunan ĉemizon ĝis la genuoj, nudajn kruojn, antaŭtukon kun bluj kaj ruĝaj strioj, mallongan glavon ĉe la flanko kaj potencan bastonon en la mano. Ĉi tiu oficisto promenis sur la trotuaro, iafoje parolis kun sia kolego, sed plej ofte sin lokis sur ŝtono, por pli bone ĉirkaŭpreni per la rigardo la amason, preterfluantan ĉe liaj piedoj.

Ĉe tia vikleco la strataj ŝtelistoj devis agi ekstreme prudente. Ordinare du el ili komencis batalon, kaj kiam kolektiĝis hom-amaso kaj la policistoj regalis per bastonoj la batalantojn kaj la rigardantojn, aliaj anoj de l' arto ŝtelis.

Preskaŭ en la mezo de la strato staris gastejo de Asarhadon, Feniciano de Tiro; en ĝi, por pli facila kontrolo, estis devigataj loĝi ĉiuj eksterlanduloj. Tio estis granda kvadrata domo, havanta de ĉiu flanko dekkelkon da fenestroj; ĝi ne tuŝis la najbarajn domojn, oni do povis ĉirkaŭiri ĝin kaj observi de tiuj flankoj. Super la ĉefa pordego pendis modelo de ŝipo, sur la fronta muro estis pentraĵoj, prezentantaj lian

sanktecon Ramzeson XII dum oferado al la dioj aŭ dum protektado de l' fremduloj, inter kiuj Fenicianoj distingigis per alta kresko kaj kuprekolora vizaĝo.

La fenestroj estis mallarĝaj, ĉiam malfermitaj kaj nur en okazo de l' bezono kovrataj per kurtenoj el tolo aŭ el koloraj vergoj. La loĝejoj de la mastro kaj vojaĝantoj okupis tri etaĝojn; malsupre estis drinkejo kaj restoracio. La maristoj, portilistoj, metiistoj kaj ĝenerale pli malriĉaj vojaĝantoj manĝis kaj trinkis en la korto, kiu havis mozaikan plankon kaj tolajn tegmentojn, pendigitajn sur kolonoj, por ke oni povu vidi ĉiujn gastojn. La pli riĉaj kaj pli alte naskitaj festenis en la galerio, ĉirkaŭanta la korton.

En la korto oni sidis sur la tero, ĉe ŝtonoj, kiuj anstataŭis tablojn. En la galerio, kie estis malvarmete, oni trovis tablojn, benkojn kaj seĝojn, eĉ malaltajn kano-pojn el kusenoj, sur kiuj oni povis dormeti.



En ĉiu galerio estis granda tablo, ŝarĝita per pano, viandoj, fiŝoj kaj fruktoj, kaj per bareloj da vino, biero kaj akvo. Netroj kaj negrinoj disportis la manĝaĵojn al la gastoj, forigis la malplenajn barelojn, alportis plenajn; skribistoj, observante la tablojn, zorge notis ĉiun pecon da pano, ĉiun ajlon, ĉiun pokalon da akvo. En la mezo de l' korto, sur pli alta loko, staris du gardistoj kun bastonoj, kiuj unuflanke kontrolis la servistojn kaj skribistojn, aliflanke kvietigis la malkonsentojn inter la malriĉaj fremduloj. Dank' al tia organizo ŝteloj kaj bataloj okazis ĉi tie malofte; eĉ pli ofte en la galerio, ol en la korto.

La mastro de la gastejo, la fama Feniciano Asarhadon, homo pli ol kvindekjara, vestita per longa ĉemizo kaj muslina skarpo, iradis inter la gastoj, por vidi, ĉu ĉiu havas, kion li bezonas.

—Manĝu kaj trinku, miaj filoj! —diris li al grekaj maristoj— ĉar tia porkaĵo kaj biero ne ekzistas en la tuta mondo. Mi aŭdis, ke ventego atakis vin en la ĉirkaŭaĵo de Rufi? Vi devus fari grandajn oferojn al la dioj, ke ili savis vin!... En Memfiso dum sia tuta vivo oni povas ne vidi ventegon, sed sur la maro pli facile estas trovi fulmotondron ol utenon... Mi havas mielon,

farunon, kaj tie en la anguloj staras la dioj de ĉiuj popoloj: En mia gastejo la homo povas esti sata kaj pia por tre malmulte da mono.

Li deturnis sin kaj eniris en la galerion,

inter la komercistojn.

—Manĝu. kaj trinku, noblaj sinjoroj! —instigis li salutante. —La tempoj estas bonaj. Lia ekscelenco, la kronprinco (li vivu eterne!) veturas al Pi-Bast kun granda sekvantaro, kaj el Supra Egipto venis oro por vendo, kaj pli ol unu el vi havos belan profiton en ĉi tiu afero. Ni havas perdrikojn, junajn anserinojn, fiŝojn freŝajn el la rivero, bonegan kapreolan rostaĵon. Kaj kian vinon oni sendis al mi de Kipro!... Mi fariĝu Hebreo, se unu pokalo da tia nektaro ne valoras du draĥmojn!... Sed al vi, miaj patroj kaj bonfarantoj, mi donos ĝin por unu draĥmo. Sed nur hodiaŭ por fari la komencon.

—Donu pokalon por duono da draĥmo, tiam ni gustumos —diris unu el la komercistoj.

—Por duono da draĥmo! —ripetis la mastro.
—Antaŭe Nilo fluos al Teboj, ol mi donos tian dolĉaĵon por duono da draĥmo! Eble nur por vi, sinjoro Belezis, kiu estas la perlo de Sidono... Rapide, sklavo!... alportu al niaj bonfarantoj grandan kruĉon da kipra vino.

Kiam li foriris, la komercisto, nomita Belezis, diris al siaj kamaradoj:

—Sekiĝos mia mano, se ĉi tiu vino valoras duonon da draĥmo! Sed la diablo lin prenu!... Ni havos malpli da embaraso kun la polico.

La interparolado kun la gastoj de ĉiuj nacioj kaj rangoj ne malhelpis la mastron observi la skribistojn, kiuj notis la menditajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj antaŭ ĉio vojaĝanton, kiu en la galerio sidis kun krucitaj kruroj sur kusenoj kaj dormetis ĉe plenmano da daktiloj kaj glaso da pura akvo. Ĉi tiu vojaĝanto havis ĉirkaŭ kvardek jarojn, densajn harojn kaj barbon de korve nigra koloro, revemajn okulojn kaj strange noblajn trajtojn, kiujn neniam, ŝajnis, sulkigis la kolero, aŭ la timo.

—Tio estas danĝera rato!...— pensis la mastro, suspekto lin rigardante.—Li havas aspekton de pastro, kaj portas nigran mantelon... Li lasis ĉe mi juvelojn kaj oron por unu talento, kaj li ne manĝas viandon, ne trinkas vinon.... Tio devas esti granda profeto, aŭ granda — ŝtelisto!...

En la korton eniris du psiloj aŭ dresistoj de serpentoj kun sako plena de venenaj rampaĵoj kaj komencis spektaklon. La pli juna ludis fluton, la pli maljuna volvis ĉirkaŭ si malgrandajn kaj grandajn serpentojn, el kiuj ĉiu sufiĉus por dispeli ĉiujn gastojn el la gastejo «Sub Ŝipo». La fluto sonis pli kaj pli alte, la dresisto tordiĝis, ŝaŭmis, tremis konvulsie kaj senĉese incitis la serpentojn. Fine unu el la serpentoj ekmordis lian manon, dua la vizaĝon, kaj la trian, la plej malgrandan manĝis la dresisto mem.

La gastoj kaj servistoj rigardis kun maltrankvilo la ludojn de l' dresisto. Ili tremis, kiam li incitis la serpentojn, fermis la okulojn, kiam la serpento mordis la homon. Sed kiam la psilo manĝis la serpenton, ili kriegis de ĝojo kaj miro...

Nur la vojaĝanto de la fronta galerio ne forlasis siajn kusenojn, eĉ ne bonvolis ekrigardi la ludon. Kaj kiam la dresisto proksimiĝis por la pago, La fremdulo ĵetis teren du utenojn, donante al li signon per la mano ne proksimiĝi.

La spektaklo daŭris duonon da horo. Kiam la psiloj forlasis la korton, al la mastro alkuris Negro, kiu servis en la ĉambroj de l' gastoj, kaj murmuretis ion kun tima mieno. Poste, oni ne scias de kie, aperis polica dekestro kaj kondukinte Asarhadonon en flankan niĉon, longe parolis kun li, kaj la respektinda mastro frapis al si la bruston, tordis la manojn kaj premis sian kapon per ambaŭ manoj. Fine li piedbatis la Negrion en la ventron, ordonis alporti al la dekestro rostitan anseron kaj kruĉon da kipra vino, kaj li mem proksimiĝis al la gastejo de la fronta galerio, kiu ŝajnis ĉiam dormi, kvankam liaj okuloj estis malfermitaj.

—Mi havas por vi malgajan novaĵon, nobla sinjoro —diris la mastro, sidiĝante apud la vojaĝanto.

—La dioj sendas al la homoj pluvon kaj malĝojon, kiam tio plaĉas al ili— respondis indiferece la fremdulo.

—Kiam ni ĉi tie rigardis la psilojn—, daŭrigis la mastro, tiregante sian grizan barbon — ŝtelistoj penetris en la supran etaĝon kaj ŝtelis viajn pakaĵojn... tri sakojn kaj keston, sendube tre multvaloran!...

—Vi devas sciigi tion al la juĝejo.

—Por kio al la juĝejo?...— murmuretis la mastro. —Ĉe ni la ŝtelistoj havas sian korporacion... Ni venigos ilian estron, ni taksos vian propraĵon, vi pagos al li dudek procentojn de ilia valoro, kaj ĉio estos retrovita. Mi povas helpi vin.

—En mia lando— diris la vojaĝanto —oni ne traktas kun ŝtelistoj, mi ankaŭ ne traktos. Mi loĝas ĉe vi, al vi mi konfidis mian proprajon, kaj vi estas responda pri ĝi.

La respektinda Asarhadon komencis sin grati inter la skapoloj.

—Homo el malproksima lando— diris li per mallauta voĉo —vi Ĥetoj kaj ni Fenicianoj estas fratoj, mi do sincere konsilas al vi eviti la egiptan juĝejon, ĉar ĝi havas nur unu pardonon: tiun, tra kiu oni eniras, sed ĝi ne havas tiun, tra kiu oni eliras...

—La dioj eĉ tra muro elkondukas la senkulpan respondis la fremdulo.

—Senkulpan!... Kiu estas senkulpa en la lando de la mallibero? —murmuretis la mastro. —Jen rigardu: tie la dekestro manĝas mian anseron, kiun mi mem volonte manĝus. Kaj ĉu vi scias, kial mi donis al li ĉi tiun frandaĵon; forpreninte ĝin de mia propra buŝo?... Ĉar la policisto venis por demandi pri vi...

Dirinte ĉi tion, la Feniciano strabe ekrigardis la fremdulon, kiu eĉ dum unu momento ne perdis sian trankvilon.

—Li demandas min —daŭrigis la mastro —la policisto demandas min: «Kiu estas ĉi tiu nigrulo, kiu sidas du horojn ĉe plenmano da daktiloj?...» Mi respondas: «Tre respektinda homo, sinjoro Phut.»

«De kie li estas?...» «El la lando de Ĥetoj, el la urbo Harran; li havas tie belan domon trietaĝan kaj kampon.» «Por kio li venis ĉi tien?» «Li venis, mi diras, por repreni de pastro kvin talentojn, kiujn pruntedonis lia patro.»

Kaj ĉu vi scias, nobla sinjoro —daŭrigis la mastro —kion rediris al mi la policisto?... Jenajn vortojn: «Asarhadon, mi scias, ke vi estas fidela servisto de lia sankteco, la faraono, ke vi havas bonan manĝaĵon kaj nefalsitajn vinojn, kaj tial mi diras al vi —gardu vin!... Gardu vin kontraŭ eksterlanduloj, kiuj koniĝas kun neniu,

evitas vinon kaj ĉiujn plezurojn kaj silentas. Ĉi tiu Phut el Harran eble estas asiria spiono.»

La koro ĉesis bati en mi, kiam mi aŭdis tion —daŭrigis la mastro. —Sed vin nenio interesas!... —indignis li, vidante, ke eĉ la terura suspekto pri spionado ne influis la trankvilon de l' Ĥeto.

—Asarhadon —diris la gasto post momento —mi konfidis al vi min kaj mian proprajon. Zorgu do pri tio, ke oni redonu al mi la sakojn kaj keston, ĉar se ne, mi plendos kontraŭ vi al la sama policisto, kiu manĝis la anseron, destinitan por vi.

—Permesu do, ke mi pagu al la ŝtelistoj nur dek kvin procentojn —ekkris la mastro.

—Vi ne havas rajton pagi.

—Donu al ili almenaŭ tridek draĥmojn.

—Ne, eĉ unu utenon ne.

—Donu al la malfeliĉuloj almenaŭ dek draĥmojn...

—Iru en paco, Asarhadon, kaj petu la diojn, ke ili redonu al vi la saĝon— respondis la vojaĝanto ĉiam same indiferente.

La mastro salte leviĝis de la kusenoj, spiregante de l' kolero.

«Jen vipero! —pensis li. —Li venis ne nur pro la ŝuldo... Li faros ĉi tie ankaŭ ian aferon... Mia koro diras al mi, ke li estas riĉa komercisto, eble eĉ restoraciisto, kiu kun pastroj kaj juĝistoj malfermos ĉi tie apud mia flanko duan gastejon... La fajro ĉiela antaŭe bruligu vin! La lepro vin manĝu!... Avarulo, trompisto, ŝtelisto, de kiu honesta homo nenion povas profiti!»

La nobla Asarhadon ne trankviligis ankoraŭ sian koleron, kiam sur la strato eksonis fluto kaj malgranda tamburo, kaj post momento enkuris kvar preskaŭ nudaj dancistinoj. La portistoj kaj maristoj salutis ilin per krioj de l' ĝojo, eĉ la seriozaj komercistoj en la galerio

komencis scivole rigardi kaj fari rimarkojn pri ilia beleco. La dancistinoj salutis la ĉeestantojn per movo de l' manoj kaj per rideto. Unu el ili komencis ludi duoblan fluton, la alia akompanis ŝin per tamburo, kaj du pli junaj dancis ĉirkaŭ la korto tiamaniere, ke estis preskaŭ neniu gas-to ne tuŝita per iliaj muslinaj tukoj.

La trinkantoj komencis kanti, krii kaj inviti al si la dancistinojn, kaj inter la popolaĉo naskiĝis malkonsento, kiun la gardistoj facile trankviligis, levinte supren siajn bastonojn. Sole iu Libiano, incitita per la vido de la bastono, eltiris tranĉilon; sed du Negroj kaptis lin je la manoj, forprenis de li kelke da kupraj ringoj, kiel pagon por la manĝo, kaj eĵetis lin sur la straton. Dume unu dancistino restis kun la maristoj, du iris al komercistoj, kiuj donis al ili vinon kaj kukojn, kaj la plej maljuna iris ĉirkaŭ la tabloj kaj kolektis monon:

—Por la templo de la dia Izido!...— kriis ŝi. —Faru oferojn, piaj fremduloj, por la templo de Izido, de l' diino, kiu protektas ĉiujn estaĵojn... Ju pli multe vi donos, des pli multe da feliĉo kaj benoj vi ricevos... Por la templo de la patrino Izido!...

Oni ĵetis al ŝi sur la tamburon volvaĵojn de kupra fadeno, iafaĵe orajn grajnoj. Iu komercisto demandis, ĉu oni povas ŝin viziti? kaj ŝi kun rideto klinis la kapon.

Kiam ŝi eniris en la frontan galerion, Phut, enigis la manon en sian ledan sakon kaj eltiris oran ringon, dirante:

—Istar estas diino granda kaj bona, akceptu ĉi tion por ŝia templo.

La pastrino penetre lin rigardis kaj murmur-etis:

—Anael, Sahiel...

—Amabiel, Abalidot— respondis per la sama tono la vojaĝanto.

—Mi vidas, ke vi amas la patrion Izidon— diris la pastrino laŭte.

—Vi devas esti riĉa kaj estas malavara, vi do meritas, ke oni antaŭdiru al vi la sorton.

Ŝi sidiĝis apud li, manĝis kelke da daktiloj kaj diris, rigardante lian manon:

—Vi venas el malproksima lando de Bretor kaj Hagit... Vi havis feliĉan vojaĝon... **De kelke da tagoj vin spionas Fenicianoj —aldonis ŝi mallaŭte...**

Venu al mi post la subiĝo de l' suno en la domon sub la «Verda Stelo» —*murmuretis ŝi.*

Sed gardu vin de l' ŝtelistoj, kiuj avide rigardas vian havon— finis ŝi, vidante, ke Asarhadon aŭskultas.

—Neniu ŝtelisto estas en mia domo!...— eksplodis la Feniciano. —Eble nur tiuj, kiuj venas de la strato.

—Ne koleru, maljunulo —diris moke la pastrino— ĉar tuj aperas ruĝa strio sur via kolo, kaj tio antaŭdiras fruan morton.

Aŭdinte tion, Asarhadon kraĉis tri fojoj kaj mallaŭte diris preĝon kontraŭ malbonaj antaŭdiroj. Kiam li foriris malproksime en la galerion, la pastrino komencis koketi la Harrananon. Ŝi donis al li rozon el sia bukedo, por la adiaŭo ĉirkaŭprenis lin kaj iris al la aliaj tabloj.

La vojaĝanto faris signon al la mastro.

—Mi volas— diris li —ke ĉi tiu virino estu ĉe mi. Ordonu konduki ŝin en mian ĉambron.

Asarhadon ekrigardis liajn okulojn, brubatis la manojn kaj eksplodis de rido.

—Tifono ekposedis vin, Harranano!...— ekkriis li. —Se io simila okazus en mia domo al egipta pastrino, oni elpelus min el la urbo. Ĉi tie oni povas akcepti nur fremdulinojn.

—En tia okazo mi iros al ŝi —respondis Phut. —Ĉar ŝi estas saĝa kaj pia virino kaj ŝi konsilos al mi en multaj okazoj. Post la subiro de l' suno vi donos al mi gvidiston, por ke mi ne perdu la vojon.

—Ĉiuj malbonaj spiritoj eniris en vian animon —respondis la mastro.

—Ĉu vi scias, ke ĉi tiu koniĝo kostos al vi ducent draĥmojn, eble tricent, ne kalkulante tion, kion vi devas doni al la servistinoj kaj templo. Por tia sumo —fine por kvincent draĥmoj, vi povas koniĝi kun virino juna kaj virta, mia filino, kiu havas jam dek kvar jarojn kaj kiel prudenta knabino kolektas al si doton. Ne vagu do nokte en fremda urbo, ĉar vi falos en la manojn de la polico aŭ ŝtelistoj, sed profitu tion, kion la dioj donas al vi hejme. Ĉu vi volas?...

—Kaj ĉu via filino veturos kun mi Harranon —demandis Phut.

La mastro mire lin rigardis. Subite li ekbatis sian frunton, kvazaŭ diveninte sekreton, kaj kaptinte la vojaĝanton je la mano, tiris lin en niĉon.

—Mi jam scias ĉion! —murmuretis li ekscitita. —Vi komercas la virinojn... Sed memoru, ke pro forpreno de unu Egiptanino vi perdos vian havon kaj iros en la minejojn. Ekster... se ni faros la aferon kune, ĉar ĉi tie mi konas ĉie la vojojn...

—En tiu okazo vi montros al mi la vojon al la domo de ĉi tiu pastrino —respondis Phut. —Memoru, ke post la subiro de l' suno mi bezonas gvidiston, kaj morgaŭ miajn sakojn kaj kestojn, ĉar aliel mi plendos al la juĝejo.

Dirinte ĉi tion, Phut forlasis la restoracion kaj iris supren en sian ĉambron.

Rabia de kolero Asarhadon proksimiĝis al la tableto, ĉe kiu trinkis feniciaj komercistoj kaj vokis flanken unu el ili, Kuson.

—Bonajn gastojn vi donas al mi por gardi!... —diris la mastro, ne povante haltigi la tremon de l' voĉo. —Ĉi tiu Phut preskaŭ nenion manĝas, ordonas al mi reaĉeti de la ŝtelistoj la pakajojn, kiujn oni ŝtelis de li, kaj nun kvazaŭ por moki mian domon li prepariĝas por viziti

egiptan dancistinon, anstataŭ fari donacojn al miaj virinoj.

—Kio miriga? —respondis Kus ridante. —Fenicianinojn li havas en Sidono, kaj ĉi tie li preferas egiptajn knabinojn. Malsaĝa estas tiu, kiu en Kipro ne gastumas kipran vinon, sed trinkas tiran bieron.

—Kaj mi, mi diras al vi, ke li estas danĝera homo... —interrompis la mastro —li ŝajnigas simplan homon, kvankam li havas mienon de pastro.

—Vi Asarhadon havas aspekton de ĉefepiskopo, kaj estas nur drinkejestro! La benko ne ĉesas esti benko, kvankam ĝi havas sur si leonan felon.

—Sed por kio li vizitas pastrinojn?... Mi jurus, ke tio estas ruzo, kaj ke la ĥeta malĝentilulo anstataŭ al festeno kun virinoj iros al kunveno de konspirantoj.

—La kolero kaj avideco nebuligis vian saĝon —respondis serioze Kus. —Vi estas kiel homo, kiu, serĉante kukurbon sur fiĝarbo, ne vidas la fiĝon. Por ĉiu komercisto estas klare, ke Phut dezirante repreni kvin talentojn de pastro, devas akiri favoron de ĉiuj, kiuj moviĝas ĉirkaŭ la sanktejoj. Sed vi komprenas nenion.

—Ĉar la koro diras al mi, ke tio estas asiria sendito, embuskanta kontraŭ lia sankteco.

Kus rigardis la mastron kun malestimo.

—Do spionu lin, observu ĉiun lian paŝon. Kaj se vi malkovros ion, eble ia parto de lia havo transiros al vi.

—Oh, nun vi diras saĝan vorton! —ekkriis la mastro. —Ĉi tiu rato iru al la pastrinoj, kaj de ili en lokon de mi nekonatan. Sed mi sendos post li miajn pupilojn, de kiuj nenio sin kaŝos!

Notu, ke ni ŝanĝis nian duan sidejon,

Kajeroj

kiu nun estas <http://www.gazetoteko.eu>



el la Suda

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ
ESPRANTISTAJ (HALE)**

REDAKCIO: **Popkresto 4461**, Tfn° (00 34) 615 **Retskribu al**
E30080 MURCIA, 427 143 **jesuo@ono.com**
HISPANIO

<http://www.gazetoteko.eu/kajeroj/k73.html>

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k73.html>



Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.

ISSN 1697-6460